



katolika **,74** ***sento*** anno 53° u.e.c.i.





KATOLIKA SENTO

**BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)**

Anno 53° - 1974

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

**Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:**
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

**Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:**
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

**Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964**

KATOLIKA SENTO

n° 4

53a Jaro

Aprilo 1974

En la Paska soleno
fundamento de nia kredo
kaj de nia espero
U.E.C.I. deziras al ĉiuj siaj aliĝintoj
abundon de gracoj kaj kristanan ĝojon
antaŭanoncantajn la eternan vivon
kun la Triumfanto super la morto

RESPEKTI LA AMON KAJ LA VIVON KIEL VA-
LORAJN DONACOJN DE DIO

(Alparolo de la Papo al la Komitato por la Familio)

Post la ĝenerala aŭdienco, la 13an de marto 1974a, la Sankta Patro akceptis la Komitaton por la Familio, de li starigitan la 11an de januaro de la pasinta jaro kun la tasko pristudi la spiritajn, moralajn kaj sociajn demandojn de la familio laŭ paŝtista vidpunkto. Al la kunvenintoj Paŭlo 6a turniĝis per la jena alparolo:

Karaj Fratoj kaj karaj Filoj,

Membroj kaj Konsilistoj de nia Komitato por la Familio, spertuloj vokitaj por aldoniĝi al ilia laboro, vi ĝojas renkontiĝi kun Ni je la fino de ĉi tiu dua

Scaronella Giacchino 7

ĝenerala Kunveno. Kredu, ke ankaŭ por Ni via ĉeesto konsistigas ĝojon. Ni benas nian Sinjoron, tial ke Ni ricevas vian ateston kaj ĉiujn pozitivajn ates^utojn, de kiuj vi estas alportantoj, ke Ni povas utili^ugi vian intensan laboron de pripensado, ke Ni povas kalkuli je via sperto kaj je via devontigo, en komp^leta fideleco al la Eklezio. Jes, via fervoro por sti^umuli la valorojn de la familio, en momento, en kiu ili forte ŝanceliĝas, portas al Ni konsolon kaj esperon.

Ni konatiĝis kun la vasta programo de via Asem^ubleo. Viaj demandaroj volis ampleksi ĉiujn dimensi^uojn de la sfero de la familio, ne evitante la brulajn problemojn, kiujn ĝi devas alfronti. Via entuta pers^upektivo estis paŝtista, kun ĉio, kion paŝtista pers^upektivo supozas pri la vivo de la personoj kaj de ili^uaj medioj, pri aŭskultado al la doktrino, pri konside^uroj teologiaj, etikaj kaj spirita^uj, pri eduka zorgo kaj socia agokapablo je longa daŭro.

Ni lasas al vi la taskon prezenti ĝian sintezon aŭ pli bone plilongigi ĝiajn vojojn, kiujn vi malfer^umis. La unua rezulto ŝajnas jam esti la loko de pro^ufunda komuneco, kiun vi starigis, en la analizo kaj en la esplorado. Ĉi tiu komuneco estas markita de du karakteroj, kiuj, laŭ Ni, donas al ĝi grandan valo^uron. Krom la gravega laboro realigita de pluraj ka^utolikoj en propra lando, temas ĉi tie pri universa^ula renkontiĝo en ĝia spirito, kaj kiu volas tia fariĝi en la faktoj.

Sed evidente la Komitato ne kapablas halti tie: ĝi devas, antaŭ ĉio, esti vigliganto: konsciigi la kris^utanajn komunumojn pri la grandega valoro de la fa^umiliaj problemoj, naski centrojn de pripensado kaj de agado: iuj regionoj jam komencis esti provizitaj, en aliaj ĉio estas farenda. Oni devas, krome, inviti al disdivido de la eltrovoj, kuraĝigi la iniciatojn, kon^utribui por ilin kompari, por ilin kompletigi, por ilin

kunordigi.

La komitato devas samtempe esti privilegiita a testanto de la familiaj interrilitoj. Ĝi devas aperigi klare ĉiujn esencajn humanajn valorojn, kiujn la familio estas vokata evoluigi en ĉiu el siaj membroj, ĉiujn kristanajn riĉaĵojn, kiujn la familio povas utili en ilia kristana vivo, ĉiujn ŝancojn, kiujn ĝi prezentas por ilia vivo en socio. Kaj ekde tie oni devas evidente reliefigi la kondiĉojn postulitajn por tia sukceso. En tiu sfero, temas pri respondo al la bezonoj de la nuna situacio, ne per pridiskuteblaj praktikoj, sed je la lumo de la plej profundaj postuloj de la homa naturo persona kaj socia, je la lumo, ankaŭ, de la perspektivoj, kiuj estis malfermitaj de Kristo kaj de la Eklezio animita de la Spirito de Kristo. Tio permesas liberigi la prioritatajn aksojn de la familia paŝtodoktrino, de kiu vi devas esti, antaŭ ĉio, la iniciatantoj.

Hodiaŭ matene Ni povas ĝuste mencii iujn el tiuj aksoj, tute ne pretendante pritrakti la aferon ĝis finde.

Antaŭ ĉio la hejmo estas la privilegiita loko de la amo, de la intima komuneco de la personoj, de la senhalta kaj progresanta praktikado de donaco inter la geedzoj, kiu devas firme baziĝi sur la unueco kaj la nerompebleco de ilia kuniĝo. Tia amo nepre antaŭsupozas korinklinon, sinregadon, paciencon, komprenemon, fidelecon kaj grandanimecon, senhalte renovigitajn je la supernaturaj fontoj de la geedziĝa sakramento.

La hejmo estas la akceptoloko por la vivo. Urĝa tasko estas formi la geedzojn al patreco kaj al alpatrineco prirespondaj. Tia respondeco montriĝas hodiaŭ tre malfacile praktikebla: fakte, la temo ne estas deturni de ĝia celo la korean agon, kaj eĉ pli

malmulte malhelpi la vivon de homa estaĵo jam konci pita; la kristanoj devas esti tre firmaĵ sur ĉi tiuj punktoj. Beataj tiuj, kiuj klopodas respekti la amon kaj la vivon kiel donacojn de Dio! Ni varme gratulas la kuracistojn, la edukistojn, la sacerdotojn, kiuj helpas la hejmojn en la sekvado de tiu postulema vojo.

La hejmo estas ankaŭ la unua loko de edukado. Tia kompleksa agado postulas hodiaŭ la kunlaboron de la gepatroj, de la edukistoj, de la tuta socio: ĝi, krome, postulas la aktivan kunagadon de la infano, kaj de la junulo, pri kiuj viaj raportoj substrekas la kapablon homan kaj evangelian.

Plie, la hejmo estas la loko de malfermo al ĉiuj aliaj komunumoj, kie estas forĝataj la energioj kapablaj teksti la ligilojn de la socia vivo, transformi ĉi tiun mondon en komunumon de fratoj. Hejmo inda je ĉi tiu nomo ne povas resti egoisme fermita en si mem. Sed malfeliĉa tiu socio, kiu ne honoras la familian institucion; tre rapide ĝi fariĝus polvo el individuoj elradikigitaj kaj anonimaj, kaptaĵo de tragiĉa izoliĝo aŭ de diktatoreco senanima.

La hejmo, precipe, estas la loko, kie disvolviĝas la graco de la Sinjoro, laŭ la bapta alvokiĝo. Multaj postuloj ĝis nun menciitaj estas vere enskribitaj en la homa naturo, kiu estas bona, sed vundita: tial ili povus, iufoje, montriĝi neeblaj al nikristanoj. Pro tio estas necese ripeti ankoraŭfoje la ne takseblan valoron de la sakramento de l' edziĝo; la sola permesanta al la geedzoj travivi sian amon konforme al la alianco de Kristo kaj de la Eklezio, kaj inici siajn gefilojn, ekde la plej frua aĝo, al la kredo de la Eklezio kaj al la apostoleco.

Tia hejmo devas esti pretigata, kaj vi pravas, kiam vi klopodas prezenti al la plejeble granda nom

bro de gefianĉoj formadon solidan, realisman, spiritan. Krome, tia hejmo devas povi kalkuli je la subteno fare de aliaj hejmoj, de la kristanaj komunumoj, je la tuta medio humana kaj morala de la socio.

La moroj dependas de la nobleco de l' animo aŭ de la malforteco de la homoj; ili dependas ankaŭ de iliaj sociaj kondiĉoj, kaj de la leĝoj, kiujn ili donas al si. Sur ĉi-lasta punkto la kristanoj ne devas rezigni siajn respondecojn. Jen alia perspektivo prezentiĝanta al via agado ĉe la instancoj naciaj aŭ internaciaj. En ĉi tiu jaro de la monda Loĝantaro, kies laborojn Ni atente sekvas, Ni konfidis al vi la taskon kunordigi la pripensadon, por pretigi kaj porti al ĝi la klaregan ateston de la Eklezio sur la familio.

Ni finas ĉi tie nian parolon. Ĝi sufiĉas por esprimi al vi la fidon, kiun ni havas al vi, kaj, trans viaj personoj, al ĉiuj, kiuj laboras, kun homa klareco kaj kristana fideleco, por stimuli la familiajn valorojn. Tutkore Ni vin kuraĝigas kaj vin benas kun nia Apostola Aŭtoritato.

trad. C. M.-P. M.

CONVEGNO DI STUDIO PER SACERDOTI

Sarà tenuto, come abbiamo già annunciato, nei giorni 28,29,30 aprile. E sarà aperto non solo per i sacerdoti che conoscono l' Esperanto e il movimento cattolico esperantista, ma anche ai non esperantisti, che nel proprio ministero incontrano difficoltà a causa della difficoltà delle lingue.

Nel programma é prevista una relazione sul tema del Convegno - tenuta da Don Ferdinando Longoni, pre-

sidente dell'IKUE. Sul tema dell'Esperanto e Studi Biblici parlerà Don Angelo Duranti, direttore di Biblia Re vuo (rivista di studi biblici e orientalistici); su "Esperanto e pastorale del Turismo" sarà relatore P. Albino Ciccanti, presidente della UECL. Su "Esperanto e Scuola Primaria" il Dott. Sergio Marini, Direttore Didattico; "Esperanto ed ecumenismo" il P. Giorgio Ko rytkowski; "Esperanto e Liturgia" Don Bruno Benini; "Esperanto e mondo socialista" il sacerdote Enrico Pa ruzel, rappresentante del movimento esperantista cattolico in Polonia.

IL 29 aprile alle ore 17 l'incontro sarà aperto a tutti, anche laici, suore e religiosi. Gli argomenti trattati da persone competenti e qualificate costituiranno un convegno di eccezionale interesse.

La adesioni accompagnate da £. 2.000 (o 3.000 se si vuole prenotare una camera singola), vanno indirizzate al: C.E.R.-centro esperantista riminese - S. Ber nardino - 47037 Rimini (FO).

DAL MONDO ESPERANTISTA

SOCI DELL'UEA - I soci della Universala Esperanto Asocio (UEA) nel 1973 sono stati 32.135, dei quali 7.064, soci individuali.

DELEGATI ESPERANTISTI - Nella prima parte dell'annuario (Jarlibro) 1973 dell'UEA, sono elencati 3.556 Delegati Esperantisti di 65 Paesi diversi. In Ita lia i Delegati dell'UEA sono 182 di 67 città diverse. Chi desidera diventare Delegato dell'UEA può rivolgersi a: "Itala Esperanto-Federacio" Via Villoresi 38 - 20143 MILANO.

REPUBBLICA ISRAELIANA - Il Presidente della Repubblica Israeliana, Efraim Kacir, ha ricevuto una de

legazione esperantista con la quale si è interessato di Esperanto, lingua che a suo tempo egli studiò, e su come poter aiutare l'opera del mondo esperantista.

CABINE TELEFONICHE - In Olanda tutte le cabine telefoniche pubbliche hanno le istruzioni per l'uso, in diverse lingue nazionali ed anche in Esperanto.

NASTRI IN ESPERANTO - La Sezione Nastri Magnetofonici della Universala Esperanto-Asocio è attualmente in possesso di 348 diversi programmi in Esperanto; tra essi le registrazioni fatte durante i Congressi di Vienna e Portland. Per informazioni rivolgersi a: Sig. Rüdiger Eichholz - 2040 Springbank Road - Mississauga Ontario - Canada.

TURISMO - E' stato approntato un nuovo pieghevole sulla città di Göteborg (Svezia) in Esperanto. Lo si riceverà gratuitamente dietro richiesta a: "Oficejo de Turismo - Parkgatan 2 - S 41138 (Svezia). Dalla mappa del pieghevole si può rilevare che al centro della città si trova Piazza Esperanto.

FERROVIERI ESPERANTISTI - Il 26° Congresso dell'Unione Internazionale dei Ferrovieri Esperantisti avrà luogo a Tarragona (Spagna) dall'11 al 17 maggio 1974. Per informazioni rivolgersi a: Segreteria FEA - Via Donato Creti 51 - I-40128 Bologna.

CONGRESSO FEI - Il prossimo Congresso nazionale della Federazione Esperantista Italiana (FEI) avrà luogo a Verona dal 14 al 20 settembre 1974.

U.S.A. - Nell'Università di Fort Lanerdale (Florida) negli USA, si tengono corsi di lingua Esperanto con un punteggio valido a tutti gli effetti, equivalente a quello delle altre lingue moderne.

FIERA DI MILANO - La Federazione Esperantista Italiana, il Centro per l'introduzione dell'Esperanto nel

Commercio, nell'Industria e nel Turismo (CEKIT) ed il Circolo Esperantista Milanese presenteranno, in aprile, in uno stand della Fiera di Milano, nel Viale dell'Editoria, libri, giornali, dischi e manifesti esperantisti. Volenterosi esperantisti di tutte le parti d'Italia si avvicenderanno per dare agli interessati informazioni e notizie.

CONSIGLIO FEI - Il nuovo Consiglio Direttivo della FEI ha così distribuito le cariche:

Ing. G. Azzi - presidente ;

Dott. A. Dazzini - vice presidente;

Cav. F. Bertoletti - Segretario, amministratore, cassiere ;

Dott. S. Martina - segretario aggiunto.

SCI PER ESPERANTISTI - dal 9 al 16 febbraio 1974, a Mala Kopa - Slovenj Gradec - Jugoslavia, ha avuto luogo la 15^a Settimana sugli sci per Ferrovieri Esperantisti. - Organizzatore: Jovan Mirkovič - Filipičeva 21-JU 62000 Maribor (Jugoslavia).

TV AUSTRIACA - La televisione austriaca ha trasmesso l'8 novembre 1973 il film in Esperanto "Aŭstralio a diaŭ".

BRASILE - A Belo Horizonte, in Brasile, è stata ufficialmente inaugurata una clinica: "Clinica Esperanto".

UNIVERSITA' DI LONDRA - L'Università di Londra ha conferito il titolo di professore in "Diritto comparato" al prof. dott. Ivo Lapenna, presidente della Universala Esperanto-Asocio (UEA).

DAL MONDO CATTOLICO

UNIVERSITA' DI TORINO - Presso la Facoltà di Scienze Politiche dell'Università di Torino si sta preparando una tesi dal titolo "La Katolika Esperantista movado

en Italujo". Chi potesse contribuire mediante informazioni o materiale, è pregato di prendere contatto con il sig. Cardone - Via Balestrieri 18/26 - 10155 Torino.

TESTI LITURGICI IN ESPERANTO - Dopo la morte di Mons. Macheiner, è stato nominato Revisore dei testi liturgici in Esperanto, Mons. Pichler, Ves covo di Banja Luka in Jugoslavia.

PADRE CICCANTI - A seguito di una intervista fatta a Padre Ciccanti e pubblicata su un settimanale italiano, la segreteria della FEI ha ricevuto ed ha risposto a più di 500 lettere di persone interessate alla lingua Esperanto.

ROMA ESPERANTA VOĈO
n°127

LA 31an DE APRILO OKAZIS la anoncita memorigo de nia roma s-ano Kav. Luigi Minnaja. Multaj el tiuj, kiuj konis kaj aprezis lin, partoprenis, por oferi dum la meso siajn preĝojn kun la roma esperantista grupo, por la animripozado de tiu, kiu estis ĝia plej elstara reprezentanto.

Post la meso ĉiuj kurvenis por aŭskulti prof. on Elio Migliorini, kiu majstre elvokis la tutan esperantan aktivecon de Luigi Minnaja, ekde la unua renkontiĝo kun la esperantista idealo, pere de kurso pri esperanto, kiun la preleganto mem enkondukis en Ro

La prelego de prof.ro Migliorini, punktita de datoj kaj precizaj referencoj, estis aŭskultita kun ekstrema atento de ĉiuj. Ankaŭ D.ro Antonio De Salvo kortu ŝe rememorigis la majstron kaj la amikon, kiu, kune kun la afabla esperanta medio de sia tuta familio, familiarigis ankaŭ al li la lingvon kaj la altajn idealajn sentojn tie travivitajn. Fine, la prezidanto de Roma Grupo, D.ro Alberto Menabene, proponis, ke de tiam la Grupo titoliĝu: "Luigi Minnaja". La propono estis aplaŭde akceptita de ĉiuj.

.....

El la Katolika Eklezio

JE LA 24a DE MARTO, en la kadro de la jubileaj celebradoj, papo Paŭlo 6a proklamis novan beatulon en la baziliko Sankta Petro. Temis pri sacerdoto Liboro Wagner, martirigita je la 9a de decembro 1631, pro sia fideleco al la katolika eklezio.

Tri jarcentoj pasis post lia morto; sed ne perdiĝis la memoro pri lia heroeco, nek la espero de lia glorigo; kaj tiel Paŭlo 6a, elaŭdante la dezirojn de la diocezo de Würzburg, proklamis antaŭ la germana Eklezio kaj la tuto mondo tiun sanktecan stelon: "Se vere, kiel la faktoj asertas, - diris la papo en la parolado dum la solena celebrado - tiu Dia servanto estas martiro, li do estas civitano de la ĉielo, li estas "beata".

"Kiu estas martiro?" demandis la papo. Kaj li tuj klarigis la terminon laŭ la strikta senco donita al ĝi de la eklezio: "Martiro estas sekvanto de Kristo, kiu donas al li ateston per sia sango. Li konfesas Kriston per la ĝissanga ofero de sia vivo. Li proklamas sian kredon mortante pro ĝi. Li demonstras per la plej forta pruvo, kiun homo povas doni, la firmecon de sia propra konvinko; kaj ne nur ĉi tion; sed li ankaŭ atestas la religian veron de sia kredo per la interveno de la Sankta Spirito, sen kies forto li ne povus elteni memvole suferojn sen ribelo, aliigante sian homan malfortecon al la plej pura heroeco. Li proklamas kun mirinda evidenteco la ekziston de riĉaĵo, la kredo, kiu estas pli valora ol la vivo mem, ĝis tio, ke la kredo montriĝas la vera vivo. Pro tio

- daŭrigis la papo, - ni estas kaptitaj de admiro, kaj ni memoras pri la vortoj de Sankta Aŭgusteno: "en la martiroj Kristo mem fariĝas atestanto"; kaj "tu estas martiro pli pro la kaŭzo de la sufero al li trudita, ol pro la sufero mem!".

Je ĉi tiu punkto la papo forlasis la italan lingvon, kaj daŭrigis en la germana:

"Ni devas gratuli la estimindan eklezion de Würzburg, kiu vidas honorata sian plurjarcentan religion tradicion per la beatigo de ĉi tiu sia filo Liboro Wagner, kiu nun, kiel martiro de la katolika kredo, estas al sia eklezio montrata por admiro kaj imitado. Ni mem ĝojegas pro lia glorado, kaj ni aŭspicias, ke ĝi estu fekunda je renovigita kristana vivo por tiu aparta eklezio, kiu havis Liboron kiel filon, sed ankaŭ por la tuta katolika eklezio.

La bildigo de lia mallonga vivo, kiu fermiĝas sur la tero por malfermiĝi en la ĉielo, per lia suferplena kaj glora morto, estas signifiĉa pri ĉiu ĝia fazo kaj indas nun, sub la lumo de ĉi tiu glorado, ke ni prikonsideru ĝin laŭ ĝiaj diversaj aspektoj, por nova prijuĝo de la historia kaj spirita kadro, en kiu disvolviĝis tiu vivo.

Multaj signifoplenaj cirkonstancoj en la biografio de la beata Liboro ebligas seriozajn kaj utilajn konsiderojn. Ĉu lia deveno el bona kaj ekzemplodona protestanta familio ne estas jam por ni motivo de respektoplena estimo pri tiu religia kristana riĉaĵo, gardita en la germana popolo, malgraŭ la renversoj de tiu suferplena epoko? Kaj la aliĝo de Liboro al la katolika religio, al kiu tiuj regionoj kuniĝis dum tiom da jarcentoj, pere de tiom da estiminda kaj riĉa florado de kristana vivo kaj humana civilizacio, ĉu ne estas por ni motivo de historia pripensado kaj de



Beata Liborio mostrata en la "Gloria" de Bernini

espero pri la tre dezirata reveno al perfekta unueco en la Eklezio, kiu, de Kristo devenante kaj al li celante, suferas pro siaj disiĝoj, dum ĝi esperas reakiri per la unika kredo kaj reviglita karitato sian feliĉan rekuniĝon?

Kaj oni konsentu al ni - daŭrigis la Papo - adresi en ĉi tiu okazo al niaj kristanaj fratoj, kiuj ĝis nun ne estas en plena komuniko kun ĉi tiu Apostola Seĝo, respektoplenan kaj afablan saluton, kaj ĉi tiu ĝuste nome de la beata Liboro, kiu ŝajnas al ni ĉiuj konfirmi en la koro voton pri ekumenismo, renovigita pacon kaj konkordon. Li, la beata Liboro, estas ekzemplo, martiro, kiun ni celebras ne por eltiri el lia martiriĝo polemikan kaj akuzan argumenton, sed kiel ateston de bona ekzemplo pri repacigo kaj fratigo.

La fakto, ke Liboro estis frekventanto de altaj lernejoj, kaj ke poste li dediĉis al sacerdoteco kaj al paŝtista ofico sian junan vivon, kiom da pensoj sugestus al ni por atesti al la kultura mondo nian estimon kaj nian konvinkiĝon pri ne nur ĉiam ebla, sed necesa harmonio inter scienco kaj kredo! kaj kiom ni volus halti ĉi-momente por adresi apartansenton, patran kaj fratan saluton al sacerdotoj kaj religioj, kiuj daŭre dediĉas al Kristo kaj al la Eklezio, entute kaj ĉiam, sian vivon! ni ekalvokos sur ilin ne nur la lumon de la ekzemplo sed ankaŭ la sekretan kaj efikan protektan potencon de la beata Liboro Wagner!

Kaj fidante, ke ni ĉiuj kontemplos en li ekzemplon de kristana forto kaj protekton de nia kredo kun la konstanta aliĝo al la Kristeklezio, ni benas la gvidanton de la Würzburga Diocezo kaj ĉiujn aliajn ĉi tie ĉeestantajn episkopojn, kun Aŭtoritatoj, Reprezentantoj kaj fideluloj, kiuj partoprenas en ĉi tiu glora kaj religia ceremonio.

"MARIALIS CULTUS" (Kulto al Maria") estas la titolo de grava latinlingva papa dokumento, subskribita je la 2a de februaro, sed diskonigita je la 22a de marto. Ĝi estas adresita al ĉiuj episkopoj de la mondo "por la ĝusta ordo kaj disvolvo de la kulto al la Beata Virgulino Maria". Ankaŭ ĉi tiu "Apostola Admono" estas daŭrigo de la postkoncilia agado por reĝustigi kaj progresigi la kristanan kul^{to}n, en kiu la devoteco al la Dipatrino, pri kiu la Eklezio zorgas kun aparta amo, estas necesa kaj distinga elemento. Fakte al la tute aparta rango, kiun la Virgulino okupis en la sava plano, devas respondi aparta kulto. Pro tio la Koncilio "admonas ĉiujn filojn de l'Eklezio, ke ili larĝanime akcelu la kul^{to}n, precipe la liturgian kul^{to}n, al la beata Virgulino" kaj "alte estimu la al ŝi dediĉitajn piaĵojn, kiuj dum jarcentoj estis rekomenditaj per la Eklezia instrua aŭtoritato". (Lumen Gentium, 67).

En ĉi tiuj lastaj jaroj, tamen, parte pro aliĝoj okazintaj en la sociaj moroj kaj parte pro evoluado de esprimaj formoj de la religia sento, kelkaj preĝformuloj, per kiuj oni manifestis devotecon personan aŭ kolektiv^{an} al la Patrino de Dio, montriĝis ne taŭgaj pro niatempa pensmaniero, ne sufiĉaj esprimi la tutan doktrinon pri la rolo de Maria, rilate la savon kaj la eklezian vivon, kaj ne ĉiam laŭaj al la fundamentaj linioj de la liturgia reformo.

Ĉi tio okazigis kelkloke malakordon inter la riĉa koncilia doktrino pri la beata Virgulino kaj ĝia instigo progresigi la kul^{to}n kaj la kultan esprimmanieron, kio okazigas ian embarason kaj krizon pri tiu pieco; kaj male, aliloke oni konstatas sinceran klopodon renovigi la kul^{to}n al la Virgulino laŭ la ĉiama eklezia tradicio kaj la akcepto fidela de la direktivoj de la Dua Vatikana Koncilio. En ĉi tiu situacio la Papo opiniis oportuna pritrakti kelkajn temojn rilatantajn

la devotecon al la beata Virgulino, por ke, post forigo de ĉiuj duboj, tiu kulto fortikiĝu en la fidelula animo kaj disvolviĝu harmonie kun la Tradicio, kun la renovigo de la liturgio, kun la doktrina progreso kaj kun la religia sentemo de niaj samtempuloj.

La dokumento havas tri partojn:

- 1) La kulto de la Virgulino en la renovigita liturgio.
- 2) Direktivoj por renovigo de la devoteco al Maria.
- 3) Indikoj pri piaj praktikoj, kiel la "Anĝeluso" kaj la Rozario.

I. LA KULTO de la Virgulino en la renovigita liturgio.

Ĉi tiu parto dividiĝas en du sekciojn.

En la unua oni ekzamenas la primarian ehhavon de la reformitaj liturgiaj libroj. Ili ne malpliigas, ki el kelkaj asertis, la kul^{to}n al la Virgulino, eĉ ili progresigas ĝin, ĉar ili enigas ĝin pli profunde kaj ordigite en la celebradon mem de la Kristaj misteroj, prilumas ĝian eklezian gravecon kaj agnoskas la unikan pozicion, kiu al ĝi apartenas en la kristana kult^o. En la reformita liturgio la devoteco al la Virgulino estas esprimita per formuloj enhavoriĉaj kaj ne malofte ame lirikaj, sed ĝi ne montriĝas memcela: tiu devoteco, fakte, devenanta de la komtemplo de la rilatoj kiuj kunigas Marian al Kristo, kaj de la multaspekta agado, kiun la Virgulino disvolvas por la Eklezio, celas aliiĝi al dia glorado pro la mirindaĵoj, kiujn li faris al ŝi (v. Luk. 1:49) kaj al fervora aktiveco de la kristana vivo.

La dokumento rapide revuas la ĉefajn verkojn de la renovigita liturgio, reliefigante en ili la rolon, kiun tie havas la beata Virgulino.

Unue ĝi prikonsideras la "Roman Kalendaron" (so

lenojn de la Dipatrino, de la Anunciacio kaj de la Senmakula Koncipiĝo; la marian aspekton de la tempo Advento-Kristnasko; aliajn festojn kaj memorigojn pri Maria, inter kiuj la antikva kutimo de la Maria sabato; al ĉi tiuj oni devas aldoni la celebradojn proprajn de kalendaroj apartenantaj al apartaj nacioj aŭ diocezoj: el kio rezultas la konstanta ĉeesto de la Virgulino en la liturgia jaro.

Poste la dokumento ekzamenas la du fundamentajn librojn por la celebrado de l'Eŭkaristio: la Roman Misa kaj la Legaĵaron. En la unua troviĝas ĉiuj grandaj temoj de la primaria doktrino kaj kulto, transdonitaj de la tradicio; kaj aliaj, pri kiuj la nuntempa atento estas pli inklina, kiel la temo de la rilatoj inter Maria kaj la Eklezio; en la dua oni konstatas notindan kolekton de bibliaj legaĵoj pri maria signifo, kiuj viciĝas ne nur en la mesoj de la Madono, sed ankaŭ en pluraj dimanĉaj mesoj kaj en tiuj, kiuj akompanas la celebradon de kelkaj sakramentoj.

La dokumento mencias ankaŭ la "Liturgion de la Horoj", en kiu ofte havas lokon la Virgulino; kaj aliajn liturgiajn librojn: Rito de la Bapto, de la Religiaj Votoj, de la Unktado de malsanuloj, ktp. - el kiuj montriĝas, kiel la Eklezio alvokas la Virgulinon dum la plej signifaj momentoj de la kristana vivo.

En la dua sekcio la dokumento montras la ekzemplifikon de Maria por la tuta Eklezio kaj por la unusopaj fideluloj en la praktiko de la kulto. Fakte estas Maria, kiu aŭskultas la dian vorton, kiu preĝas kaj laŭdas Dion, kiu transdonas la vivon kiel patrino, kiu oferas la Filon, kunigante sin al lia ofero. La Eklezio reproduktas ĉi tiujn sintenojn en la kulto: ŝi aŭskultas la dian voĉon en la Liturgio de la Vorto, ŝi laŭdas la Sinjoron kaj peradas la savon de la mondo, naskas al la vivo per la sakramentoj, kunve-

nigas la fidelularon por oferi la eŭkaristian hostion, memorige de la morto kaj reviviĝo de Kristo.

II - DIREKTIVOJ por la renovigo de la kulto al Maria.

Kiel oni memorigis, la Koncilio deziras, ke apud la liturgia kulto ekfloru ankaŭ aliaj preĝmanieroj, precipe tiuj rekomenditaj de la instrua Eklezia aŭtoritato, aŭ enkondukitaj laŭ episkopaj dispozicioj aŭ per legitimaj kutimoj. Tamen kelkaj devotecaj formoj kelkfoje bezonas revizion, por anstataŭigi la velkemajn elementojn, por fortikigi la esencajn kaj transpreni la doktrinajn, akiritajn per la progreso de teologiaj studoj kaj de la eklezia instruo. Sed tiu revizio - laŭ la admono de la Sankta Patro - devas esti respektema pri la tradicio kaj malfermita al la justaj postuloj de nia tempo.

La papa dokumento donas por tio kelkajn direktivojn. Ili admonas, ke la kulto al la Virgulino:

prilumu la kristologian direkton, nome la nesolveblan nodon kaj la esencan rilaton de la Virgulino al la Savanto;

agnosku la ĝustan gravecon en la rilato de la Virgulino kun la Sanktiga Spirito;

vigligu la biblian vorton, eltirante el ĝi inspirojn, temojn kaj esprimforton;

montru harmonion kun la liturgia renoviĝo, atentante ĝiajn stilon kaj ritmojn;

spegulu la ekumenan movadon, fariĝante mem kunigilo de la kristanoj;

priatentu la nunajn vivkondiĉojn, precipe de la virino en la hejma, socia, politika, kultura sferoj.

La apliko de ĉi tiuj direktivoj ebligas kulton al la Virgulino pli kaj pli fortan kaj puran.

La ekzemplo de Maria, la unua kaj perfekta disĉiplino de la Sinjoro, estos pli efike proponata al la imitado de nia tempaj homoj, malgraŭ la diversaj soci-kulturaj kon

diĉoj, ĉar havas universalan kaj stabilan karakteron la esencaj motivoj, laŭ kiuj la Virgulino estas tre valida modelo por la kristana popolo, nome: aliĝo al la vorto de Dio, fideleco al sia tasko, servopreta karitato, aktiva kunlaboro por savagado. La direktivoj de la dokumento estas pozitivaj; al tiuj kuniĝos laŭokaze diskreta aŭ energia klopodo por elimini difektojn, kiuj kelkloke eniĝis en la kulton al la Dipatrino: supraĵa kredemo, sterila sentimentaleco, mensa malvasteco, avido de novaĵoj aŭ de eksterordinaraj faktoj, priserĉo de legendaj elementoj.

III - INDIKOJ pri piaj praktikoj, kiel Anĝeluso kaj Rozario.

La tasko renovigi aŭ krei primariajn piaĵojn, surbaze de la supre indikitaj normoj, apartenas laŭ ilia graveco kaj disvastigo, al la Apostola Seĝo, al la Episkopaj konferencoj, al Episkopoj, al religiaj Familioj, al ĉiu laŭleĝa kristana komunumo. La Papo pritraktas apartenante du preĝojn, pri kiuj la Apostola Katedro plurfoje okupiĝis: la "Angelus Domini" kaj la Rozario.

Pri la unua, la dokumento donas insistan inviton gardi ĝian recitadon, kvankam aliiĝis sociaj kaj lokaj kondiĉoj.

Pli ampleksa estas la pritraktado de la Rozario. La dokumento memorigas la sciencajn kaj animzorgajn esplradojn, el kiuj reliefigis pli evidentaj la esencaj karakteroj de la Rozario: la evangelia kaj kristologia aspektoj, ĉar el la evangelio la Rozario eltiras la "m i s t erojn", kiujn ĝi kontemplas, nome la savajn momentojn de la vivo de la Elaĉetinto; la laŭdan, petan kaj kontemplan naturon. Ĉefe sen ĉi tiu lasta aspekto, la Rozario estus kvazaŭ senanima korpo, kaj riskus fariĝi mekanika ripetado de formuloj. La Sankta Patro dumakcentas ankoraŭfoje la valoron de la pia kutimo, invitas uzi ĝiajn elementojn, kiujn la tradicio transdonis al ni. Aliaj

similaj preĝoj, sin inspirante al la Rozario, povas disvolvi iun aŭ alian el ĝiaj aspektoj, por pli bone komprenigi kaj revalorigi ĝian spiritan riĉecon.

Pluraj petis, ke la Rozario estu deklarata liturgia preĝo. Oni devas agnoski, ke laŭ kelkaj vidpunktoj, ĝi bone akordiĝas kun la liturgio; sed ĝi ne devas miksiĝi aŭ superi ĉi tiun, kiel kelkfoje okazis; ĝi devas nur gardi sian fizionomion de preĝado, kiu kapablas komprenigi kaj travivi pli bone la Liturgion.

Fine la Papo en sia Apostola Letero ilustras la valoron de la rozaria preĝado en familia medio, kiu, kva za ŭ hejma Eklezio" transprenas per la komuna preĝado sian esencan funkciadon de preĝanta kolektivo kaj trovas en Maria la plej luman ekzemplon.

EŬROPA KOMUNECO ESTAS tiel alta idealo por la socia vivo de la multaj popoloj en la malnova kontinento, ke la Sankta Seĝo nepre ne povis tion malatenti.

Fakte klopodoj por atingi ĉi tiun celon estis ĉiam kuraĝigitaj de Pio 12a, Johano 23a kaj Paŭlo 6a, kiuj plurfoje akceptis delegitarojn de eŭropaj organizoj. La Sankta Seĝo kontaktis ne-oficiale kun ĉi tiuj, ĝis 1970a, jaro en kiu estis akreditita Apostola Nuncio ĉe la Brusela Eŭropa Komunumo, kaj Speciala Sendito kiel Permanenta Observanto en la Eŭropa Konsilio de Strasburgo. La aktuala Apostola Nuncio, rezidanta en Bruselo, eŭropa ĉefurbo, estas mons. Igino Cardinale, samtempe, laŭ la normo, ankaŭ Dekano de la Diplomataro.

La esencaj punktoj, kiuj konsistigas la strukturon de la Eŭropa Komunumo, rilatas grandparte politikajn kaj ekonomiajn celojn, nome: fortikigi la fundamentojn por plia kunigo inter la eŭropaj popoloj; akceli ekonomian kaj socian progreson de iliaj ŝtatoj, forigante la barojn, kiuj dividas Eŭropon; favori konstantan plibonigon de la vivo kaj de la laboro, per ekonomia unueco

kaj progreso de pli malriĉaj regionoj; interrili kun transmaraj landoj kaj inviti la aliajn eŭropajn ŝtatojn partopreni en la Komunumo.

Kompreneble la funkciado de la reprezentanto de la Eklezio estos prefere aktiva pri tiuj sferoj, kiuj estas pli proksimaj al la spirita celo de la katolika Eklezio. En la Eŭropa Konsilio la Nuncio partoprenas en la kunsidoj kaj en la Konsulta Asembleo, kiel Permanenta Observanto kaj estas la necesa peranto inter la Sankta Seĝo kaj la Ĝenerala Sekretario de la Konsilio. Kvankam la S. Seĝo ne estas ĝia membro, tamen ĝi kunlaboras en multaj kampoj kunligitaj al ĝia universala tasko, ĉefe en la socia, kultura kaj scienca tereno kaj al progreso de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj. Ĝi do povas doni vastan kunlaboron, ekzemple en la problemoj pri junularo, pri uzado de stuporigaĵoj, pri protekto kaj gardo de la hommedico, de arkeologio, ktp.

La Sankta Seĝo havas ankaŭ delegiton ĉe la Konsilio por la kultura kunlaboro de la Eŭropa Konsilantaro. Kiel partoprenanta membro la Sankta Seĝo portas al ĉi tiu instituto sian riĉan sperton pri instruado kaj edukado, efektivigata per multaj lernejoj kaj universitatoj en Eŭropo kaj en la tuta mondo. Kaj la S. Seĝo aparte interesiĝas pri la gardo de tiuj moralaj kaj spiritaĵoj bazoj, sur kiuj estis starigitaj la eŭropaj civilizacioj kaj kulturoj. Unu el la plej freŝdataj ekzemploj de tiu kunlaborado, povas esti montrata en la Simpozio organizita en Lovenjo, en 1972, per la Apostola Nuncio en Belgujo, pri la temo: "La religio en la lernejoj kaj tekstoj en Eŭropo".

Pasintjare, fine, la Sankta Seĝo fariĝis membro de la Eŭropa Konsilio pri la aranĝaj fondusoj por la naciaj rifuĝintoj, kies celo estas helpi tiujn eŭropajn ŝtatojn, kiuj havas loĝantaron pluson kaŭze de rifuĝin-

toj aŭ elmigrintoj, devigataj vivi malproksime de siaj hejmlandoj. Temas pri miloj da personoj, kiuj bezonas asiston, komprenon kaj oportunan loĝigon, en la nomo de tiuj principoj homaj kaj spiritaĵoj, kiuj ĉiam gvidis la eklezian agadon. Tiel la ĉeesto de la Sankta Seĝo en la multaj ekleziaj organizoj, donas palpeblan signon de ĝia subteno por la Eŭropa kunigado.

LA KATOLIKA PRESAĴARO EN POLLANDO riĉiĝis pro nova monata revuo: "W Drodze" (Irante), eldonita de la dominikana pola provinco, kaj dediĉita al ĉiuj, kiuj klopodas priserĉi, per pripensado kaj studo, la internacian lumon de la vero kaj la dian atingon. "Ni volas kontribui por estigi medion pri lumigata kredo - estas akcentite en la enkondukado de la periodaĵo - montrante samtempe kiom hodiaŭ povas helpi la riĉeco de la tradicioj. Ni celos, ke nia revuo helpu iomete al la spirita vivo de la kredanto, en nia moderna tempo, al katoliko vivanta en la sistemo Dio-homo-mondo; kaj ke "W Drodze" estu gazeto de klaraj diagnozoj kaj formuloj. Per la penadoj de la penso, de la preĝado kaj de la vivo, ni klopodos atingi la veron".

Karakterizante la celojn kaj la sferon de la nova periodaĵo, la redakcia komitato reliefigas, ke "kiel Dominikanoj estas nia tasko kaj monaka idealo kunigi la dezerton kun la bruado de la urbo, kontemplon kun disvastigo de la evangelio". La publikigo de "W Drodze" koincidas kun la 750a datreveno de la fondaĵo kaj de la agado de la predikista ordeno en Pollando.

La unua numero prezentas interalie eseon pri la temo de la feliĉo, pritraktita en la paŝtista tribuno de la dominikana centro en Poznano. La redaktoroj esperas, ke la nova katolika revuo alportos valoran kontribuadon al la scienco kaj kulturo de la poloj.

REPREZENTANTOJ DE 8 protestantaj eklezioj kaj de la katolika, kunvenis en Bujumbura, Burundo, por pri ekzameni eblecon de komuna traduko de la Biblio en la kirundan lingvon.

Partoprenis en la kunsido D-ro Peacok el Nairobi, kunordiganto de la Bibliaj tradukoj en Afriko. Prezentante la proponon, li vaste raportis pri la historio de ĉi tiu biblia movado. De la 1815a j. la Biblia Asocio, li diris, celas meti je dispono de ĉiuj homoj, en ĉiuj lingvoj, la tekston de la dia vorto, sen konsidero de la doktrinaj diferencoj, kiuj povas ekzisti inter la eklezioj. Kompreneble, dum longa tempo malkonkordo kaj eĉ opozicioj inter ili malhelpis la celojn de la Biblia Asocio. Feliĉe hodiaŭ la pensmanieroj aliĝis. La dua Vatikana koncilio akcelis biblian movadon inter la kredantoj de la katolika eklezio.

Ĝis nun la Biblio aŭ ĝia parto estis tradukita en ĉirkaŭ 1500 lingvojn, el kiuj 600 en Afriko. Ekzistas nun en ĉi tiu kontinento 200 novaj projektoj pri traduko aŭ revizio, el kiuj 80 kunlabore inter katolikoj kaj protestantoj.

D-ro Peacok parolis ankaŭ pri la problemoj de la postkanonaj libroj. Ĉi tiuj, kiuj troviĝas meze de Malnova kaj Nova Testamento, ĝenerale ne estas agnoskataj de la protestantaj eklezioj kiel revelaciitaj; ili aperas en la greka teksto sed ne en la antikva hebrea. Ĝenerale, li daŭrigis, oni do antaŭvidas du eldonojn, unu kun kaj unu sen la postkanonaj libroj. Sed, dum la Biblia Asocio pere de donacoj ricevitaj de la kristanoj, povas financi (kelkfoje ĝis 60 procentoj) bibliajn eldonojn, tiel ke eĉ malriĉuloj povas aĉeti ilin, la postkanonaj libroj pri neniu helpo ĝuas.

Ĉe la fino de sia longa parolado dr. Peacok men-

ciis kelkajn aspektojn de la tradukaj laboroj. Oni devas akordiĝi pri ortografio kaj pri propraj nomoj de venantaj el la latina ĉe la katolikoj kaj el la angla aŭ la greka ĉe la protestantoj. La sama rimarko validas por kelkaj doktrinaj terminoj. Pro tio oni ne devas zorgi pri interpretaĵoj, sed esplori la ekzaktan vortosencon en la originala teksto. Ĉefa afero estas havi 2-4 burundajn kapablajn tradukistojn, seble, konantajn la grekan kaj la hebrean lingvojn; sed per tradukisto konsilanto oni povas kompensi ilian mankon. Poste oni devas formi revizian komitaton el 8-10 personoj, kiuj prezentos siajn rimarkojn. Fine oni devas konsulti 30-50 personojn, elektitajn el ĉiuj kategorioj, por certiĝi pri la kompreno de la lingvo. Oni devas kalkuli du integrajn jarojn por la traduko de la Nova Testamento, kaj 3-4 jarojn por la Malnova Testamento.

DAŬRAS EN ETIOPIO strebadoj por superi la gravan situacion kreitan de la sekeco. Laŭ informoj el Adisabebo, per la iniciatoj de la lokaj aŭtoritatoj, flankitaj de pluraj volontulaj organizoj, inter kiuj la germana "Caritas", oni evitis katastrofon, kvankam la severa kontraŭmalsata batalo ankoraŭ ne estas venkita. P. Michael Doheny, kiu estras en Eŭropo la agadon entreprenitan de la irlanda organizo "Concern", diris, ke multaj homaj vivoj estis savitaj per la eklezia agado.

La germana "Caritas" oferis donacojn je ĉirkaŭ 735 mil dolaroj. Helpaj organizoj gvidataj de katolikoj, permesis alfluon en la etiopajn domaĝitajn regionojn, de nutraĵoj kaj kuraciloj, krom konstruojn de putoj kaj de porasistaj centroj. Laŭ la kalkuloj de UNO en la du provincoj de Tigre kaj de Wollo, la ĉiutaga manko de greno atingas 150 mil tunojn. Nur plurjara plano kapablas superigi ĉiujn malfacilaĵojn.

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI

Quota di abbonamento L. 1500

Abonkotizo italliroj 1500

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV/70
BOLLETTINO MENSILE